

Akademio Internacia de la Sciencoj

OProf Amri Wandel

Prezidanto _____



Novjara mesaĝo al AIS-anoj, januaro 2020

Estimataj membroj kaj kunlaborantoj de AIS,

Ĝus finiĝis la 5-a Luminesk en Nördlingen apud Munkeno kie kunvenis la **ĝenerala asembleo** de AIS, kiu elektis novan senaton por la oficperiodo 2020 – 23. En la nova gvida teamo de AIS troviĝas multaj novaj vizaĝoj. **La novelektita senato** konsistas el ses senatanoj: Amri Wandel (Prezidanto), Michael Maitzen (Vicprezidanto), Bengt -Arne Wickstom (kasisto), Duncan Charters, Francesco Maùrelli kaj Orlando Raola, kaj sep vic-senatanoj: Michele Gazzola, Federico Gobbo, Alfred Heiligenbrunner, François Lo Giacomo, Anna Striganova, Dima Ŝevĉenko kaj Kristin Tytgat. Rimarkinde, duono el la senatanoj estas estraranoj de UEA.

Luminesk ankaŭ gastigis la 13-an sesion de la **Internacia Vintra Universitato (IVU)**. En ĝi okazis ĉi foje nur tri prelegoj (Ŝevĉenko, Nevelsteen kaj Wandel). Ekzameno okazis nur en la lasta, La dek ekzamenitoj ricevis siajn atestojn dum la lasta vespera programo

Mi urĝe invitas proponojn de prelegoj kaj kursoj por la venontaj studsesioj de AIS: la IKU-AIS sesio dum la UK en **Montrealo**, fine de julio (konciza resumo kaj biografieto, sume ĝis unu paĝo, **limdato 15.1.2020**) kaj la Sanmarineca Universitata Sesio (**SUS 37**) kiu okazos kadre de la Germana Kongreso kaj la Fervojista Kongreso fine de majo en Frankfurto ĉe Odero (**limdato** por la proponoj: fino de **februaro**).

La tekstoj de la kontribuoj aperos en la IKU-AIS libro, kiu estos aĉetebla dum SUS 37 kaj la UK. Ĝia formato estos simalia al la pasintjara ege sukseca IKU-AIS-libro kiu elĉerpiĝis kaj estis represita kaj nun denove haveblas ĉe UEA kaj AIS.

Kiel mi jam informis en mia septembra cirkulero, ĉi-jare denove okazos la konkurso por la plej bonaj sciencaj verkoj. Temas pri la du-jara **Premio Pirlot**. Ĉi foje estos disdonitaj 9 premioj en tri kategorioj: libro, artikolo, kaj prelego. La unua premio estas 100 eŭroj, kaj la sumo de premioj estas ĉ. 500 eŭroj. Proponoj de taŭgaj verkoj aperintaj en la du lastaj jaroj bonvenas ĉe informo@ais-sanmarino.org ĝis la fino de aprilo 2020.

Kiel konate, AIS ne plu petas la jarkotizon (0.1 AKU aŭ 6,50 eŭroj), do gravas via libervola subteno. Ĉi jare AIS intencan inaŭguri novan kadron, la **Scienca Societo Frank**, por aprezi siajn subtenajn membrojn, kiuj kontribuas la 10-oblon de la baza jarkotizo, nome 65 eŭrojn. Ili ricevos honor-ateston, ekzempleron de la IKU-AIS libro kaj estos invitataj al solena akcepto dum SUS.

Donackvitancojn laŭ la germana impostleĝo eblas peti al trezoristo@ais-sanmarino.org. Eblas pagi per la UEA-konto de AIS (aisc-j), la Paypal-konto de AIS, kreditkartoj aŭ la AIS-hejmpaĝo <http://www.ais-sanmarino.org/>.

Amike, Amri